



TEA-BULTENO

10^a JARO

MARTO - APRILO 2007

NUMEROJ 3-4

Marta Programo	
02 - vendredo	20h00 - La duonokulvitro, 15-minuta videofilmo en Esperanto
03 - sabato	17h00 - Enrico MAZZOLLI prezentos sian libron "La guerra di Julius Kugy", en Salono Beethoven (Germana Instituto)
06 - mardo	20h00 - Ordigo de hemeroteko
09 - vendredo	20.00 - Priesperanta temo, zorge de Elena Zerpini
10 - sabato	17h00 - TRAVOJAĜANTE ĈINION! Filmo de Edvige Ackermann (salono 2-etaĝa)
13 - mardo	20h00 - Ordigo de hemeroteko
16 - vendredo	20h00 - Ni cerbumu per esperantlingvaj enigmoj!
20 - mardo	20h00 - Ordigo de hemeroteko
22 - ĵaŭdo	17h00 - TRIESTO MIRINDA! Prezento de ravaj bildoj - Pino Valle (salono 2-etaĝa)
23 - vendredo	20h00 - VOJAĜO EN SICILIO - zorge de Elda kaj Pino
27 - mardo	20h00 - Ordigo de hemeroteko
30 - vendredo	20h00 - Bonvenon al IFEF-estraro
31 - sabato	Kunsidoj de IFEF-estraro en TEA
Aprila Programo	
01 - dimanĉo	Tuttaga ekskurso kun IFEF-estraro
03 - mardo	20h00 - Ordigo de hemeroteko
06 - vendredo	20h00 - Diapozitivaj de Anita: Turkio
07 - sabato	10h00 - Junularo vizitas Trieston!
08 - dimanĉo	Bonan Paŝkon al ĉiuj!
10 - mardo	20h00 - Ordigo de hemeroteko
13 - vendredo	20h00 - <i>Lecturae Dantis</i> Esperante, itale kaj triestadialekte
17 - mardo	20h00 - Preparlaboroj por Karstaj Tagoj
20 - vendredo	20h00 - Verboj kun prepozicioj kaj prefiksoj - ekzercada traduko
24 - mardo	20h00 - Preparlaboroj por Karstaj Tagoj
25-30 aprilo	KARSTAJ TAGOJ 2007

KARSTAJ TAGOJ 2007

25-30 aprilo 2007

25/04: alveno de partoprenantoj, vespermanĝo kaj nokta promonado tra la urbo

Ekde la 26^a ĝis la 30^a de aprilo tagmeze:

- ★ vizitoj al la Kasteloj de *Miramare* kaj *Duino*;
- ★ pieda promonado laŭlonge Pado *Rilke*;
- ★ prezentado de Karsto kaj ĝiaj grotoj per diapozitivaj;
- ★ speleologia ekskurso en Karstaj kavernoj;
- ★ pieda ekskurso tra karsta valo nomata *Val Rosandra*;
- ★ laŭ arbaraj padoj kaj sur traboritaj ŝtonkampoj en mirinda karsta naturo;
- ★ vizito de la urbocentro kaj de la Muzeo "Speleovivarium";
- ★ gastronomia itinero inter Karsto kaj maro.

30^a de aprilo - Post tagmanĝo, lasta tostado, salutoj kaj ĝisrevidoj.

Unu el niaj celoj: Speleovivarium

Kio ĝi estas? Kiam oni parolas pri Triesta Karsto, tuj oni ekpensas pri grotoj kaj ties mistera mondo kaj fascina arkitekturo, disetendiĝanta sub ĝia surfaco. Turisto, vizitanta la subterajn kavojn, estas kutime ravata de la bel-eco de la mirindaj rokbrodaĵoj kaj ensorĉata de la silento, rompita nur de milda tiktakado de akvo-guta falado. Sed en tiu ĉi medio sin kaŝas nekonata popolo de vivaj estaĵoj. Ĉi tie la natura evoluo sukcesis krei multajn speciojn de organismoj apartenantaj al vasta gamo de zoologiaj grupoj, kiuj trovis sian vojon por vivi kaj plue evolui en mondo senluma, karakterizata de tute apartaj klimato-faktoroj.

Tiuj ĉi bestoj, nomitaj ĝuste "kavern-estaĵoj", estas postrestaĵoj de forpasintaj epokoj, nome aŭtentaj vivantaj fosilioj. Ne facilas havi eblecon observi ilin en ilia natur-medio, sed feliĉe, en ĉi tiu artefarita tunelo, iama kontraŭaviadila rifuĝejo, oni kreis la muzeosimilan strukturon "Speleovivarium", kiu proponas al vizitanto kontakton kun tiuj ĉi unikaĵoj per dioramoj, akvarioj kaj basenoj. Oni povas observi *Troglacharis anophthalmus*, blindan kankreton, kelkajn centimetrojn longan, ofte troviĝantan en la subteraj akvoj de rivero *Timavo* kaj en kelkaj riveretoj enfluantajn en la Danuban basenon; kaj *Niphargus stygius* kaj aliajn bestetojn apartenantajn al tiu mirinda mondo kia estas la Triesta Karsto.

Sed la plej tipa besto loĝanta en la karstaj grotoj estas sendube la proteo (*Proteus anguineus*). Tiu ĉi rara amfibio vivas en la subteraj akvoj de nia Karsto, en zonoj de

Gradisca d'Isonzo, Sagrado, Monfalcone kaj Duino. Krome ĝi troveblas en Istrio kaj Dalmatio. Ĉi tiu vertebrulo, unikaĵo de la eŭropa faŭno, loĝas ekskluzive en la subteraj akvoj. La ĉirkaŭa medio kompreneble influas ĝian haŭt-koloron, roz-blankan. La proteidoj naskiĝas normalaj, nome havantaj la okulojn, sed en la daŭro de ĉ. tri jaroj tiuj subhaŭtiĝas ĝis malapero. Maksimume 30 centimetrojn longa, ĉi tiu besteto havas eksterajn branĵojn. Ĝia specio estas minacata de malapero, pro la ĉiam pli kreskanta polucio de la akvaj stratumoj.

Danke al la projekto "Speleovivarium", oni havas vere unikajn ŝancon konatiĝi kun ĉi eksterordinara kreitaĵo!

Kurta Kino Esperanto Festivalo

REZULTOJ DE LA KONKURSO

Celebre de la centjariĝo de Triesta Esperanto-Asocio, estis lanĉita en septembro 2006 la **1^a Internacia Konkursuro pri kurtfilmoj**, je libervola temo, kies oficiala nomo estis: KURTA KINOESPERANTO FESTIVALO. Edvige Ackermann, prezidanto de TEA kaj de la organiza konkursa komitato, kaj Giampaolo Coloni, arta direktoro, aktive kunlaboris por ĝia realigado.

Alvenis ellaboraĵoj el Italio, Litovio kaj Ukrainio. Tiujn priuĝis ĵurio de 12 personoj el Triesto kaj el Rijeka, Kroatio. La publika prezento de la verkoj okazis la 16^{an} de februaro, kadre de aranĝoj pri la Semajno de Internacia Amikeco, dum la proklamo de la gajnintoj la sekvan 23^{an}.

La aŭtoroj de la unuaj tri klasifikigitaj kurtfilmoj ricevos premion, en formo de libroj, medalo kaj videofilmoj pri Triesto kaj ties regiono, kaj partopren-diplomon.

Jen la nomoj de la gajnintoj kaj la titoloj de la respektivaj filmoj, kun aldone la komentoj de la juĝantaro pri la prezentita verko:

1^a premio (105 poentoj) al Alberto GROSSI (Massa, Italio) por la filmo: EMOCIOJ (daŭro 8' 28") - "pro la admirindaj, ravaj bildoj, reliefigitaj de impresema muziko, kaj profesieca uzo de teknikaĵoj. Oni tamen devas aldoni, ke la elparolo ne estis tiom komprenebla, iom tro rapidema kaj mallaŭta, dum prononco ne ĉiam klaris".

2^a premio (93 poentoj) al Genovaitė LIEPINIA (Joniškio, Litovio) pro la filmo: KUNE EN LERNEJON (daŭro 11' 01") - "pro ties originaleco, imitanta la stilon de malnovaj, silentaj filmoj, kaj pro temo eble iom naiva sed sugestoplena. Ankaŭ la fakto, ke ĝi estis «lernejana agado», ludis favoran prijuĝon".

3^a premio (85 poentoj) al Tatjana AUDERSKAJA (Odessa, Ukrainio) pro la filmo: BIRDOJ DE UKRAINIO (daŭro 6' 40") - "pro interesa prezentado de la loka naturo. Ankaŭ en ĉi tiu kazo, kaj elparolo kaj prononcmalmaniero iom difektis la tuzon".

Al la gajnintoj tre korean dankon pro la partopreno adresas la organizantoj kaj varman gratulon pro la entute meritoplena laboro.

Ĉijare ne estis amasa partopreno, sed same oni decidis

relanĉi la konkurson, kun espero ke kuraĝe anonciĝos multe pli da filmantoj, tiel akceptante la defion elprovisiajn kapablojn en la kinoarto. Fantazio, deziro rakonti ion novan, emo al superado de propraj limoj, jen kelkaj ingrediencoj, certe sinkaŝantaj ie en vi mem, utiligeblaj por produkti kurtilmon, sencoplenan kaj novajalportan. Informoj pri starto de la 2^a konkurso pri Kurtfilmoj esperantlingvaj aperos plej baldaŭ. Jam nun vi povas vin anonci, mesaĝante al noredv@tele2.it

Itala Esperantista Junularo invitas vin al la 31^a Internacia Junulara Festivalo

120 jaroj de Esperanto:

120 jaroj da interkompreniĝo kaj paco

Lignano Sabbiadoro (UD) 5-10 aprilo 2007

En julio 1887, doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof publikigis ruslingve la unuan gramatikon de la "Lingvo Internacia". Do, en la nuna jaro oni festas la 120^{an} datrevenon de tiu evento.

Nia celo estas prezenti al vi la samajn principojn de toleremo kaj paco kiuj inspiris Zamenhof kaj aliajn. La interkultura komunikado kaj la porpaca edukigo estas en la hodiaŭa mondo fundamenta. La internacian scenejon karakterizas gravaj malstabilecoj, militoj kaj tensioj. Eŭroponivele, per akcepto en la EU de novaj ŝtatoj, paŝo antaŭen estos farita por la paco kaj interkompreniĝo en tiu kompleksa kaj delikata mozaiko el kulturoj kaj popoloj, kie grave rolis etnaj kaj lingvaj minoritatoj; sed ne nur lokaj minoritatoj, sed ankaŭ tiuj el ĵusa migrado, venintaj el mondlokoj kies kulturo kaj radikoj ege diverssas el tiuj eŭropaj.

Ĝuste pro tio ni elektis la regionon Friulo-Julia Venecio: ĝi reprezentas idealan scenejon, kulturen vojkruciĝon inter la areoj latina, slava kaj ĝermana; ĝi estas regiono el minoritatoj (friula kaj slovena), el elmigrintoj kaj laste el enmigrintoj.

Al la **tema programo** kontribuos interalie *Renato Corsetti* (UEA hodiaŭ kaj hieraŭ), *Davide Astori* (La filozofiaj radikoj de la esperanta movado), *Michele Gazzola* (Lingva ekonomiko kaj la raporto Grin) kaj aliaj el multaj esperanto-organizoj!

Riĉigos la **distran programon** ekskursoj al **Udine** kaj **Trieste**, lingvokursoj (pola, araba, itala, esperanta...), prelegoj pri mondvojaĝoj kaj turniroj de futbalo kaj volejbalo!

Kaj **vespere** estos koncertoj, teatraĵo, diskejo, gufuĵo kaj aliaj italaĵoj!

Ni atendas vin!

Nicola Ruggiero - IJF-administranto
ijf.admin@esperanto.it

Por informoj kaj aliĝoj retaj
<http://iej.esperanto.it/ijf/2007>

Etaj informoj!



La juna japana esperantologo *Usui Hiroyuki* reĝisoros la traktadon de la kongresa temo de la 92^a UK en Jokohamo (4-11 aŭgusto): "Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto". Bone progresas la aliĝoj: 1387 personoj el 53 landoj. Ĝisnuna nombro de aliĝintaj japanoj egalas al 798!!!

Interesa iniciato de Chuck Smith Laborperejo instigas esperantistojn gajni monon

La 15^{an} de novembro oni festis la kvinjarigon de VIKIPEDIO en Esperanto. Por soleni ĝin, estis lanĉita nova reta projekto, kiu, laŭ ĝiaj aktivuloj, eble povos iĝi same grava por la Esperanto-movado. La retejo Eklaboru.com estas la unua reta laborperejo en Esperanto. Esperantistoj, kiuj serĉas taŭgajn taskojn, povas tie afiŝi informojn pri siaj kapabloj kaj deziroj, dum esperantistaj organizaĵoj kaj unuopuloj povas diskonigi novajn postenojn kaj farendaĵojn.



EKLABORU!

Sed pli bone ol klarigaj vortoj, klaras mem rigardado, kiel ekzemple ĝis nun progresis la afero!

Laŭ la iniciatintoj, la lanĉo de Eklaboru.com estas grava paŝo por Esperanto, ĉar laboro estas signifa parto de la homa vivo, kaj ĝis nun oni ege malofte povis utiligi Esperanton en sia laboro. Nun la reto tamen donas tute novajn eblojn, ĉar laboranto ne plu bezonas troviĝi en la sama loko kie estas la dunganto. "Se antaŭe oni volis dungi esperantiston, oni devis havi bonegajn kontaktojn ene de la movado por trovi eĉ nur unu taŭgan kandidaton" diris la iniciatintoj dum intervjuo kun Libera Folio (www.liberafolio.org).

Chuck Smith, fondinto de VIKIPEDIO en Esperanto kaj nuntempa estrarano pri informado por la TEJO, en 2003, li plentempe volontulis por tiu organizo en Roterdamo. Poste li laboris dum kelkaj monatoj por la Kalgaria Esperanto-Centro (Kanado). Li forte kredas, ke Esperantio havas grandan potencialon por enspezi monon, sed oni devas akcepti la fakton ke Esperanto povas (kaj devas!) esti komerca medio. Per ĉi tiu retejo, li volas helpi al esperantistoj trovi laboron kaj laborantojn. Ĉion ĉi li realigis kune kun Judith Meyer kaj Melissa Robertson. Subtenindas kaj disvastigendas ĉi tiu tre grava iniciato – Esperanto devas estis konkreta parto de nia vivo!



Ziko Van Dijk kaj la historio de UEA

La 3^{an} de novembro 2006 okazis en Utrecht (Nederlando) doktoriĝo pri Esperanto, nome pri la historio de Universala Esperanto-Asocio. Ziko van Dijk, germana historiisto, publike defendis sin kontraŭ la demandoj de komisiono, en kiu estis ankaŭ la tutnederlande famaj historiistoj kaj aŭtoroj Herman von der Dunk kaj Maarten van Rossem. Post laŭdacio fare de la doktriganto Duco Hellema, profesoro pri la historio de internaciaj rilatoj, kunpromocianto Marc van Oostendorp aldonis pli personan gratulon en Esperanto.

Ziko van Dijk, kiu antaŭ sia lastatempa edziĝo nomiĝis Sikosek, priskribis la historion de la monda asocio kun atento al politikaj demandoj. Fakte, vere okazis politikaj kunpuŝiĝoj kaj problemoj por UEA, ekzemple rilate al la agadoj de Hitler kaj Stalin, sed per politiko oni ankaŭ

kamufliis personajn ambiciojn. Ĝenerale, la Asocio sufiĉe bone trairis la tempestojn de la 20^a jarcento, sed ofte devis sin adapti al la eksteraj kondiĉoj.

Kiaj kazoj estis la kazoj Hans Jakob kaj Ivo Lapenna? Ĉu sovetianoj simple povis membriĝi en UEA? Ĉu judoj povis esti delegitoj dum la Hitler-regado? Kiel UEA akceptis la germanojn post la Dua Mondmilito? Kion oni opiniu pri la altaj membronombroj en orienteŭropaj landaj asocioj? Kvankam en la centro de la libro estas UEA, necesis okupiĝi ofte ankaŭ pri unuopaj landoj. Bazo estis, krom intervjuoj, gazeta trastudado kaj legado de la koncerna literaturo, precipe la arkivo de UEA, kiun van Dijk rajtis uzi.

La rezulto estas germanlingva libro kun 459 paĝoj, "Die neutrale Sprache. Eine politische Geschichte des Esperanto-Weltbundes" (Bydgoszcz 2006; ISBN 978-83-89962-03-4). La prezento, ilustrita per parte ankoraŭ nekonataj fotoj el la historio de UEA, flue iras tra la jardekoj kaj ankaŭ ne timas tiun aŭ jenan anekdoton. La aŭtoro prezentis sian verkon en la Malferma Tago de la Centra Oficejo la 25^{an} de novembro pasintjara.

La libro estos havebla ĉe la grandaj Esperanto-libroservoj aŭ ĉe la aŭtoro.

(Laŭ informoj de la gazetara servo de la Universitato Utrecht kaj Ziko van Dijk.)

Eldona aktivado en Italio

Aparte fruktiĉa estis, okaze de la 91^a UK en Florenco, la traduk- kaj eldon-agado. Jen ĉi sekve listo de libroj el itala literaturo, mendeblaj ĉe la libroservo de IEF:

★ ESENCA LERNOLIBRO DE LA ITALA LINGVO *M. Mezzadri - trad. D. Astori*. Esperantlingva gramatiko por lerni la italan, kun testoj de memtaksado (pĝ. 256; € 8,50)

★ GVIDLIBRO PRI FLORENCO EL GUIDA RAPIDA D'ITALIA - (TCI), trad. di P. V. Orlandini. Priskriboj de palacoj, preĝejoj, ks kun aldone vortareto pri arkitekturaj terminoj. Kun koloraj fotoj. (pĝ. 280; € 22,50)



★ KSENOFOBIA GVIDLIBRO AL LA ITALOJ *M. Solly, trad. A. Löwenstein*. Amuzserca priskribo de la ĉefaj kutimoj kaj fobioj de la italoj, laŭ vidpunkto de fremduloj. (pĝ 72.; € 9,00)

★ LA GEFIANĈOJ *A. MANZONI, trad. B. Cadei*. La ĉefverko "I Promessi Sposi". (pĝ 500; € 27,00)

★ LA MALEMULOJ *G. VERGA, trad. G. Rinaldo, A. Ruffatti, P. Tosato*. La mirinda verko de Giovanni Verga, "I Malavoglia", per kiu la aŭtoro prezentis la sicilian socion, havantan tiujn apartajn moralajn kaj politikajn sentojn en tiu speciala histori-periodo post la Italia Unuiĝo. (pĝ 262; € 18,00)

★ LA PRINCO *N. MACHIAVELLI, trad. Carlo Minnaja* Scienc-politika ĉefverko (pĝ 104; € 10,00)

★ LE RADICI CULTURALI DELL'ESPERANTO *COMENIO. Trad. Giordano Formizzi*. Pensoj de Comenio pri la problemoj de internacia lingvo. Tekstoj en latina kaj esperanta lingvoj. (pĝ 160; € 12,00).

Katalogo troveblas ĉe www.esperanto.it aŭ riceveblas paperversie, mesaĝante al fioroni.livio@libero.it. Libroj mendeblas rekte aŭ rete ĉe IEF - Via Villaresi, 28 - 20145 Milano) aŭ ĉe UEA - Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam - uea@co.uea.org; <http://www.uea.org>



SOJO Natura nutraĵo Mirakla legomo

Certe ja bone konata estas tiu legomo, tre praktika kaj utila por kuirado, aĉetebla kiel dehidratigita granulaĵo ĉe normalaj vendejoj kaj superbazaroj kaj longtempe konservebla ĝis ĝi ne rehidratigas.

Sojo entenas preskaŭ 30-40 procentojn da proteinoj je alta biologia valoro, nome kun ĉiuj esencaj aminacidoj, kontraŭ la 15-20 procentoj enestantaj en viando. Ĝi entenas de 12 ĝis 25 procentoj da polinesaturitaj grasoj kiuj ne estas danĝeraj por la sangocirkula sistemo.

Krome, en ĝi troviĝas limigita kvanto da ameloj kaj sukeroj (10-15%): pro tio ĝi estas manĝaĵo malpeza kaj rapide digestebla, male ol la eŭropaj tradiciaj legomoj, senkonsidere de ĝiaj pluraj sekundaraj komponantoj, ege valoraj, kiaj vitamino B¹², aliaj vitaminoj kaj mineralaj saloj, kaj ankaŭ la sojlecitino, tiu sava fluidigilo kaj transportilo de la plusa kolesterolo.

UZADMANIERO

Enverŝu 1 parton da sojo-granulaĵo en 3 partojn da akvo aŭ malgrasa buljono. Aldonu preferatajn aromojn kaj salon kaj boligu la tuton dum 20 minutoj. Poste ĉion ripozigu 30 minutojn. Forte intermane premu por senakvigi la kaĉon, forigante la tutan likvaĵon. Jen sojo nun pretas por kuirado kaj/aŭ prilaborado samkiel viando. Konservu ĝin en fridujo. Jen tre simplaj receptoj por prepari ege bongustajn manĝaĵojn:

SOJO-KASULETO (VEGETARANA)

Ingrediencoj (4 samtablanoj)

- 100 g da pretigita sojo-granulaĵo
- 500 g da senŝelaj tomatoj
- 250 g da fazeoloj
- ¼ da cepo
- 1 ajlo-bulbero
- 1 celeria trunketo
- oleo
- salo k pipro

Preparado

Subrostu en oleo haketitajn cepon kaj ajlon. Aldonu ĉiujn aliajn ingrediencojn. Aldonu, laŭguste, salon kaj pipron. Kuiru dum preskaŭ 30 minutoj. Se oni uzas fazeolojn el skatolo, 20 minutoj sufiĉas. Servu ĝin tre varme.

BIFSTEKOJ LAŬ VENECIA STILO

Ingrediencoj (4 samtablanoj)

- 4 sojo-bifstekoj
- 2 cepoj
- 1 supkulero da faruno
- 50 cl da seka blanka vino
- oleo
- salo k pipro

Preparado

Preparu 4 sojo-bifstekojn per kompaktigo de la sojo-granulaĵo, samkiel por pretigo de hamburgeroj. Haketu cepojn kaj blondigu ilin en oleo. Aldonu la sojo-bifstekojn kaj vinon. Kuiru je alta temperaturo kelkajn minutojn. Aldonu farunon, salon, pipron kaj lasu kromkuiro dum kelkaj minutoj, enmetante kelkajn akvogutojn. Bone kunmiksi la kuirrestaĵon por densigi la saŭcon. Servu ĝin ege varme. Bonan apetiton de **Viglo!**



FAMA NOVAĴO EN GAZETARO

Ĉu vi legis kaj ŝatis ĝin? Iomete maldeca, al ĝi ne indas tiom da bruo, kaj, kiel kutime, ĉio finiĝos per granda ridego.

Viglo

Mallonge pri... da Vortaro Germana- Esperanta ĉe fama

lingvosciencia eldonejo en Hamburgo/Germanio. Tiu vortaro enhavas pli ol 160.000 serĉvortojn kaj parolturnojn sur 1679 paĝoj grandformataj. La vortaro do estos la plej granda kaj ampleksa Esperanto-vortaro aperinta ĝis nun en la mondo. Informis la aŭtoro Prof. d-ro Erich-Dieter KRAUSE, membro de Akademio de Esperanto - edklexik@t-online.de

Esperanto je la servo de la entreprenoj

Vizitinda: <http://www.mondo.be/Esperanto/index.html>
Laŭ informo aperinta en www.mondo.be en pluraj lingvoj, i.a. en Esperanto. Okazo prezentigas por ke Esperanto-parolantoj esprimu sian kontenton, aprezon kaj aprobon en Esperanto en ties gastlibro.

Inf: "Germain Pirlot" gepir.apro@pandora.be

Internacia Amika Societo Kalocsay havas proprajn retpaĝojn! Fondita en 1991 kiel memstara jura persono, gvide de s-ino Ada Csiszár, ĝi okupiĝas unuavice pri la flegado de Kalocsay-vivoverko, kaj hodiaŭ jam havas pli ol 40 membrojn. Adreso de la retejo: <http://www.esperanto.hu/kalocsay>



OSIEK-PREMIO 2006

En 2006 la OSIEK-anoj proponis 20 verkojn premiindajn: ĉiuj estis prezentitaj en la junia numero de LA GAZETO. Dum la Internacia Esperanto Konferenco en Timișoara, Rumanio, sekreta voĉdonado atribuis la premion, al

André Cherpillod

pro **KONCIZA ETIMOLOGIA VORTARO**

Gratulon!

La premio, 600 €, rekompenas vivantan aŭtoron pro publikigita verko ne fikticia aŭ pro grava traduklaboro.

Informis: LA GAZETO, FR-55210 Creuë - Francio
<http://osiek.org>

Ĉu vi jam renovigis vian abonon al LA GAZETO? La abono egalas al 28 € por 6 numeroj. Por pliaj informoj, poŝte, rete aŭ telefone, jen la abon-peranto por Italio

Elda Doerfler – Via Ghirlandaio 18/1 – 34138 Trieste
tel. 040 398562 - testudo@adriacom.it
Poŝta konto: N° 17452996 Trieste Centro

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste

tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperantotrieste@adriacom.it; noredv@tele2.it

Grupa ttt-ejo: <http://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatristiana>

Poŝta adreso: CP 601 c/o Ufficio Postale Trieste Centro

IT-34132 Trieste - Italio

Poŝtĉekkonto N° 10834349



ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Società senza fini di lucro fondata nel 1906 - Societo sen profitaj celoj fondita en 1906
Registro Regionale del Volontariato n° 531

Caro samideano, quest'anno non abbiamo ancora avuto il piacere di riconfermarti tra i nostri soci. Con ogni probabilità, dati gli impegni ai quali nessuno di noi può sottrarsi, non ne hai avuto il tempo.

La quota annuale è da tre anni ancora di € 40,00 comprendente l'invio bimensile del "Bulteno", con l'invito a frequentare la nostra sede e partecipare così a tante attività.

Il 2006 è stato l'anno del nostro centenario, nel corso del quale abbiamo cercato di apparire in pubblico, mediante l'organizzazione di varie manifestazioni, alcune delle quali di grande rilievo e successo.

Il raggiungimento di un simile traguardo per un'Associazione quale la nostra è motivo di orgoglio per tutti, ed a ciò ci siamo arrivati grazie anche al sostegno di tutti i soci. Quanto è stato svolto nell'arco dello scorso anno ha richiesto l'impegno continuo di molti *asocianoj*, che hanno contribuito in vario modo alla realizzazione dei vari eventi, sia con la propria presenza e collaborazione che con aiuti finanziari. Grazie perciò al pagamento regolare delle quote e alla generosità delle vostre elargizioni siamo riusciti a celebrare degnamente il centenario di fondazione della vostra Associazione. Questo per sottolineare quanto la quota annuale è importante per la sopravvivenza della TEA e soprattutto per il proseguimento della sua attività, a favore della diffusione della lingua internazionale Esperanto.

Per tua comodità, se non puoi venire personalmente, ti allego un nostro conto corrente postale tramite il quale potrai fare il versamento e, se vuoi, puoi anche integrarlo con un piccolo contributo per noi comunque molto importante.

Scusami se ti ho importunato, ma l'associazione, per poter operare fattivamente alla diffusione del comune ideale, ha bisogno che tutti i soci collaborino per quanto loro possibile, chi presenziando, chi sostenendo: l'importante è essere assieme in un modo o nell'altro.

Il cassiere
Giuseppe Valle

Trieste, marzo 2007